Aparte taŭga estis la parko, kie esti agrable sidigi sur la herbo kaj iom spontane kunveni kaj babili. Iuj grupoj, ĉefe el Brazilo, tiel ludis gitaron kaj kantis por la plezuro de ceteraj partoprenantoj. La parko estis aparte oportuna por tie okazigi la interkonan vesperon, ankaŭ nomata "Esperanto-Foiro". Tie stariĝis diversaj budoj de Esperanto-asocio, kiuj prezentis siajn aktivecojn, siajn dokumentojn, siajn aranĝojn, verkojn, eldonaĵojn. La franca asocio prezentis siajn novajn prospektojn, afiŝojn, novajn bild-rakontojn. Ĉe alia budo eblis trovi multajn vortarojn de etnaj lingvoj al Esperanto.




La budo de Esperanto-France kun deĵorantoj de nia federacio.

Havis ankaŭ budon Pola Radio, Bona Espero el Brazilo, Kava Pech el Ĉeĥio, kaj kompreneble ankaŭ Japanio por inviti al la venontjara UK en Jokohamo, kaj multaj aliaj asocioj, landaj aŭ fakaj. Estis vere agrable konstati kiom diversa kaj bunta estas la Eesperanto-movado.



Komprenoble ankaŭ interesa estis la aliaj programeroj, teatraĵoj Tamen la nacia vespero kun vira koruso estis ege modesta, ĉefe kompare kun la nacia vespero en Ĉinio antaŭ du jaroj.

Krome la urbo Florenco estas plena je historiaj riĉaĵoj, vere mirinda urbo, en kiu svarmas multaj turistoj. Estis pli ol 2200 partoprenantoj el 65 landoj. Inter kiuj, la plej granda nombro venis el Francio.



A. Grossmann



Multaj Esperanto-vortaroj por diversaj etnaj lingvoj

Eldonaĵoj de Kava-Pech. Deĵoras Petro Chrldle el Ĉeĥio



Bona Espero en Brazilo informas pri siaj aktivecoj. Deĵoras g-roj Grattapaglia.

Invito al venonta UK en Jokohamo




Postkongreso en malgranda lando Malto

Post partopreno al UK en Florenco, trideko da samideanoj aliĝis al la postkongreso en Malto proponita de Luci Harmon el Usono. La 6an de aŭgusto la grupo veturis de Florenco al la flughaveno en Romo por fluge atingi la insulon Malto.




Malto estas malgranda lando kun nur 400.000 enloĝantoj, ĝi konsistas el 3 ĉefaj insuloj, Malto, Gozo kaj Komino. Ĝia situo faris, ke multaj gentoj ĝin invadis dum pli ol 5000 jaroj. Tial ĝia historio kaj historiaj restaĵoj estas abundaj kaj riĉaj. Dum tiu semajno ni sukcesis malkovri la diversajn aspektojn kaj historiaĵojn de tiu landeto.

La malta lingvo originas je 80% de la araba kaj je 20% de la itala, sed estas skribata per latinaj literoj en tre katolika lando. La dua lingvo estas la angla pro longa okupado fare de Britio. Malto sendependiĝis nur en 1964, sed daŭre oni veturas maldekstre. Pro uzo de la angla lingvo, aliaj lingvoj estas nur malofte uzataj en restoracio kaj turismaj lokoj, tamen la itala estas tre ofte komprenata de loĝantoj.



Okazas en diversaj urbetoj multaj lokaj festoj ligitaj al religio. Tiam la urbetoj kaj aparte la preĝejoj estas ege ornamitaj kaj iluminataj. Okazas religiaj procesioj kun muzikistoj. La tuta urbo festas per piroteknikaĵoj, kiuj okazas dum pluraj horoj eĉ en plena tago kun blua ĉielo. Certe dumnokte ili estas pli belaj kaj dumtage pli bruaj. Ni ĝuis tian etoson en la urbetoj Lija.

Preĝejo apud Sliema, kie troviĝis nia hotelo.



Ni krozadis de Valette la ĉef-urbo de Malto al la malgranda insulo Komino. Tie ni haltis ĉe la Blua Laguno kun la ebleco naĝi. Dum ĉi tiu krozado ni fakte ĉirkaŭis la tutan insulon Malto kaj preterpase ni povis spekti multajn belaĵojn. La Granda Havena Enirejo al Valette, la Marsascale Golfeto, St. Thomas Golfeto, Insula Golfeto kaj la Lageto de Petro, la plej granda fiŝkaptista vilaĝo de Malto kaj la mirinde fascinaj kavernoj nomataj Blua Groto.

Valette: urbo de la kruckavaliroj. La stratoj plej ofte direktiĝas al la maro.



En Valette troviĝas la plej malnova teatro en Eŭropo, la Teatro Mancel. La plafonon oni nun restaŭras.





Jen la mallarĝaj stratoj de la urbo Medina kaj panoramo de la urbo Rabat. Certe tipa pejzaĝo en Malto, kun malmulte da verdaĵoj kaj ĉefe blankaj aŭ flavaj domo kun plataj tegmentoj.



Tamen jen, ne nur ŝtonoj sed ankaŭ iom da verdaĵoj kaj floroj. En la Botanikaj ĝardenoj de San Anton. Nia grupo kun nia gvidantino kaj interpretistino Luci Harmon.



Jen la insulo Gozo kun mirindaj pejzaĝoj, plezuro por fotemuloj. Ni atingis ĝin en 20 minutoj per pram-ŝipo de Chirkewwa al Mgarr.

En Gozo ni ankaŭ vizitis la prahistorian templon Ggantija en Xaghra, la Citadelon en Victoria, la Kaverno de Calypso, (legenda ŝirmejo de la diino Calypso filino de Atlas), la Lazuran Fenestron, Dwerja kaj la enlandan Maron.



En la lasta tago ni ekskursis kaj vizitis la plej antikvajn templojn kun restaĵoj de pli ol 5000 jaroj. La Prahistoria templo, la Hypogeum en Saflieni kaj la Tarxien Templo Komplekso. Poste ni ĝuis la prahistorian lokon de Ghar Dalam kaj ties muzeon, la templo-komplekson ĉe Hagar Qim kaj Mnajdra. En Malto abundas la historiaj eventoj pro multaj invadoj, de Fenicianoj, Romianoj, Araboj...

La Blua Groto estas tre fama en Malto. Ĉu eblas ne viziti ĝin. Per boatoj ni atingis falte plurajn grotajn kaj konstatis la mirindan bluan koloron de la akvo.



Dum tuta semajno ni ĝuis agrablan veteron. Ni spertis la vivon en malgranda lando, ni eksciis pri ties longa kaj ampleksa historio. Ni ĝuis ankaŭ agrablan Esperanto-etoson. Ni dankis al nia komplezema gvidantino, Luci Harmon, kiu ĉion bone organizis kaj planis malgraŭ la lokaj cirkonstancoj.

André Grossmann

... Nu, ni menciuj nur supraĵe la uzveturadon de ĉirkaŭ okdek tuneloj, foje ne longaj, meze de agresiva trafiko, en kiu implicas centoj da kamionoj, kies ŝoforoj tutsimple neniam enmemorigis la fakajn regulojn de perfekta stirado kaj de „bona konduto”... Ni do lasas malantaŭ ni la tiel nomatan ”italan Riviera” kaj baldaŭ malkovras sub pure blua ĉielo la mirigan kaj mirindan Toskanon... Ne temas ĉi-tie verki laŭdajn liniojn, kiujn turismaj gvidlibroj oportune kaj plej allogite ofertas!

Jen Florenco, atingita post ĵus „ĝuinta” fulmotondro... Preskaŭ friskas la aero sed ni ne malpaciencaĝu, la sekvantaj tagoj alportos la ĝis nun neelĉerpeblan plensomer-klimaton.

„ Ni petas... *Ostello della Gioventu villa camerata*” ? Ni ja iomete devojiĝis fine de la itinero tamen antaŭe zorge ellaborita, sed promenanta preteriranto afable kaj helpeme „ĉiĉeronos” nin voĉe kaj franclingve, tiamaniere ke ni atingas senprobleme la enirejon de la vasta parko, iom ekster la urbocentro, en kiu lokiĝas la impona junulgastejo, fine de suprendekliva vojeto. Ne surprize ni jam trafas francajn geamikojn kaj esperantistojn el kvin aŭ ses landoj. Solviĝas rapide la kutima enir-formularo. Fakte anticipe kaj akurate prizorgis la alvenon de la gastoj *Cristina*, el la skipo de la kongres-organizantoj, kies afablecon kaj sindonemon ni jam aprezis... perrete!

Ĉu aldoni, ke tiu „vilao” estas ja aŭtentika domo, en kiu tutcerte loĝis iaepoke ne malriĉaj posedantoj. Ni ja mutas je okulumo al la muroj kaj plafonoj, nedubebaj postsignoj de la iama ĉeesto de florenca familio. Bonega ideo tiu decido konservi la konstruaĵon por igi modernan junulgastejon...

Sed scivolemaj ni estas malkovri... la „Kongresejon”! Disponiĝas proksime bus-linio, kiu ebligas atingi la „*Palazzo dei Congressi*” post veturo tra jam tipaj kvartaloj, kiuj jam anticipas nian deziron frandi la laŭdire „*plej belan urbon de Italio*”...

Post la elbusiĝo ni kalkulis pri indikiloj, kiuj faciligus la piede rapidan atingon de la rendevuejo. Ĉu ni estus misuzintaj la taŭgan bus-haltejon? Ne, jen la vere majesta „*Santa Maria Novella*”, jen la vasta urba stacidomo, ni miras pri la centoj da motorcikloj, preskaŭ nur la famaj „*Vespa*”, kiuj paralelas kvazaŭ gluitaj unu al la alia sur la aliflanka trotuaro... Ni vane serĉas ian flagon, ian inform-afiŝon pri la evento, ian sagon, kiu faciligus la aliron al la kongresejo... Tiumomente ni rememoras pri Vilnius. Ĉu malpermesate „reklami” pro urba leĝ-regulo? Ŝajne ne... Vastaj paneloj emfazas pri punktaj manifestacioj rilataj al „*Unita*”, la maldekstra politika partio. Ekboletas nia menso... Ĉu UK-o en Florenco, en kiu svarmas dum la tuta jaro miloj da turistoj el ĉiuj partoj de la mondo, ne estintus trafa okazo por riveli al ili la daŭran ekziston kaj vivantecon de esperanto?...



Finfine, jen la „enirejo” de la Palaco, jen longa inform-banderolo... ternivele fiksita! Jam svarmas la „samideanoj” sur la larĝaj aleoj ĉirkaŭ -kaj sur- ..la verda gazon-ebenaĵo, kie okazos plenaere la fama interkona vespero!

Ni supreniras la eksteran ŝton-ŝtuparon kaj eniras... Kia abelujo! Dekoj kaj dekoj da homoj „fizike” premiĝas en tro eta ĉambro kaj iom post iom sukcesas tamen enŝoviĝi en pli „komfortan” larĝan koridoron, kie mirakle kelkaj povas ripozi kelkminute sur flankaj, ĉemuraj benkoj. Denove ĉi-tie teleskopiĝas viroj kaj virinoj, junaj kaj maljunaj, inter kiuj multaj okulumas ĉirkaŭen por malkovri la giĉetojn de la akceptejoj... Jes, ni ja vidis en la antaŭa aludita ĉambreto, unumetron longa, klarigan planon

fiksitan ĉe la muro... sed kiu sukcesis alproksimiĝi sufiĉe por interpreti ĝin?

„*Hep, Sinjorino... maldekstren!... Vi povas uzi la lifton!...*” La sopirata akceptejo situas ja je la tria nivelo sube! La plej aĝaj gastoj vicumas antaŭ la lifto, la ceteraj malsupreniras ŝtupare, kuntrenante sian valizon...

Subite, jen vasta lumigita halo, kun okultrafa foto-panoramo de Florenco unuflanke kaj la klasikaj giĉetoj aliflanke. Oni senprobleme, post iom da pacienco, ricevas la kutiman dokumentaron... Surprizo, la ŝtofan ujon donacas la firmao „*TAKE*”... Gratulon al ĝi!

Ek de tiu momento laŭtas la intersalutoj, la interkizadoj, la interbrakumadoj! Jen la varma kaj ne anstataŭebla ero de universala kongreso!


Nun, grava cerbumado... Ni trafolumas la riĉan programon de la evento, kaj kiel kutime, ankoraŭ pli pripensige en Florenco, ni provas ellabori liston de nepraj „kulturaj ĉeestoj” ... Ĉu jam konfesi, ke ni poste iĝos tre malobeemaj, rilate la elektitajn prelegojn... Kulpos ja la eksterordinare allogaĵoj dissemigitaj en la urbo... Vi komprenu, ke ni iĝos certagrade „malbonaj” kongresanoj profite al emo malkovri nelaciĝebla la urbajn vidindaĵojn...

Bonan ideon konkretigis la organiz-skipo proponante perrete kajereton, en kiu interesatoj povus malkovri, dank’ al plano de la kongres-ĉirkaŭaĵo, rekomenditajn restoraciojn laŭ moderaj prezoj. Jen tamen ia diskriminacio por la enpartoprenantoj, kiuj bedaŭrinde ne posedas hejme komputilon... Nu, funkcios rapide la informilo „buŝ-orelon” kaj la aluditaj „trattoria” gastigos malsatajn kongresanojn, kiuj malkovros la dekojn da manieroj ellabori bongustajn pladojn de pastaĵoj!

(sekvota)

D P

Rumanio, lando de unikaĵoj ...



„ Mi havis grandan deziron konatiĝi kun Rumanio, kaj volis viziti ĝin antaŭ ol ĝi enirus (eble eniros) en frenezan modernigon...

Mi ne diros la preparojn por la aĉeto de bileto *Eurolines* por la vojaĝo, tio estis tre longa pro diversaj diroj kaj kontraŭdiroj de la responsuloj. Tamen la tago de ekiro venas.

En la buso sidas ĉefe emerituloj kaj gejunuloj. Ĉio iras glate ĝis la limo de Germanio, sed, iom post Strasburgo, germana policisto kontrolas zorgeme ĉiujn pasportojn kaj anoncas ke kelkaj inter la busanoj ne estas en ordo, kaj ke ĉiuj devas eliri el la buso. Kiu estas la peko? La policisto, en malbona angla lingvo, anoncas al 5 junaj rumanoj, ke ili ne rajtas trapasi la sojlon de la germana teritorio, ĉar tio ne estas skribita en ilia vizo, kiu mencias nur permeson por Francio. Ja tiuj gejunuloj revenas de lernoĵaro en franca universitato, en la kadro de la oficiala projekto "*Comenius -Socrates*". Kiel reveni al Rumanio sen trapasi Germanion?... "*Iru per aviadilo, diras la germana policisto, vi faras delikton, via vizo ne koncernas Germanion*" La diskutoj eterniĝas inter la obstina policisto kaj la studentoj, kiuj ne povas kompreni kiun delikton ili faras. La busanoj klopodas subteni la studentojn, sed vane. Rezulto: Ni devas atendi dum du horoj en kruela suno, ĝis kiam la policisto fine decidiĝas fari provizoran paperon al ili kvin. Kiel punon, li prenas la 100 eurojn, kiun junulino posedas. De la aliaj li ne povas preni monon, ĉar ili havas nenion. "*Eltur niĝu por ke la ambasadejo de Francio redonu al vi la mon-punon*" Kruela stulta policisto! Ni ufis post la liberigo de la studentoj, sed kun amara sento ke la limoj estas malfermaj nur por la riĉuloj, kiuj povas vojaĝi aviadile.

La vojaĝo daŭris 35 horojn, kaj nun mi estas ĉe *Julia*, en kvietaj kvartalo, en blok-domo ĉirkaŭata de verdaĵo. Julia mem zorgas pri multaj plantoj kaj floroj en la apartemento kaj sur la balkono. Kio ĉefe frapas min en *Cluj*, kiu entenas 350 000 loĝantojn? Unue, impresado de granda dinamismo: novaj domoj kreskas kiel fungoj, la malnovaj estas riparataj. Ĝi estas alloga urbo, kiu povas rivali kun multaj eŭropaj urboj (*...pli bela ol Bucarest*, diras la Clujanoj...). La urbo disponas pri belega botanika ĝardeno, al kiu Julia gvidas min, pri diversaj teatroj, inter kiuj la granda teatro pri kiu mi rakontos pli poste, monteto kun kruco kaj belega vidpunkto sur la urbo, bona reto de busoj, bela promenado laŭlonge de la rivero. Kelkaj homoj almozpetas, ne tro multe. Mi konatiĝas al Cluj pli intime, ĉar mi akompanas Julia-n al diversaj utilaj lokoj por la ĉiutaga vivo: la poŝtoŝtupo, la foiro sur strato kun la legom-vendistoj, la malgrandaj magazenoj kiuj vendas ĉion, la banko (luksa), kaj ankaŭ la klubo por malriĉaj virinoj, (en kiu Julia estas inter la animantoj), regata de la protestanta paroĥo. Tie la virinoj teksas tapiŝojn per ŝtof-bendoj eltonditaj el malnovaj vestoj. Mi rimarkas, ke ĉiu kvadrata centimetro de ŝtofo estas zorge utiligata. Por kelkaj horoj de tiu laboro (tondado de bendoj, kudrado de iliaj ekstremaĵoj por kunligo aŭ sanĝo de koloroj, teksado) kaj por alia laboro de lan-tapiŝoj kaj brodaĵoj, ili ricevas tagmanĝon. Ili ĉefe rompas la izoladon kaj sentas sin utilaj.

Nun mi revenas al esperanto. Julia povas fieri pri jam 50 jaroj da esperantisteco. Ŝi ankaŭ karieris kaj vivtenis sin per ludo en pupateatro. Ni babilas abunde pri ĉiuj temoj, sed ni ne restos izolitaj. Dum du post-tagmezaj aldoniĝas *Anneke*, kiu venas el Nederlando. Ŝi estas ĉarma poetino. La sekvan tagon okazas la klubon de Julia. En la kultur-domo venas *Shandor, Lidia, Doina, Marika*. Ĉe la fino de la renkonto, Doina proponas al mi tujan viziton al la operejo por senpaga spektaklo "*La nupto de Figaro*". Mi do ŝuldos tiun rimarkeblan ne-atenditan eventon al esperanto. La sekvan tagon mi vidos la aliajn klubanojn de Julia, kaj baldaŭ mi iros al *Praid* per la buso.

Nun mi iras per buso al *Praid* (*Parajd*, diras la tabulo ĉe la komenco de la vilaĝo, kiu estas du-lingva, ĉar 90 procento de la loĝantoj tie parolas hungare, aldone al la rumana oficiala) La knabinoj en la buso sci-povas la anglan, sufiĉe por indiki al mi en kiu bus-halto mi devos eliri. Ĉe la blok-domo, kie loĝas *Lenke*, mi trovas agrablan apartementon kaj florojn. Cikonioj alte nestitaj protektas la vilaĝon, kie vivas 3500 loĝantoj (fakte pli multe, ĉar *Praid* estas kurac-vilaĝo, kun sal-minejo kaj baseno de sala akvo, do aldoniĝas la kuracatoj). Mi tuj entuziasmiĝas pri la bela kampara pejzaĝo, la montoj, kelkaj kun molaj kurboj, kelkaj pli deklivaj. Estas la plena sezono de fojnoj. Ĉaretoj tirataj de ĉevaloj, nekredible multnombraj, pasas sur la vojo en bela muziko de hufo-feroj, kun la homoj sidantaj sur fojno, postlasante fortan agrablan odoron de sekigita herbo. Mi ne laciĝas rigardi ilin, mi admire gapas. La aŭtomobiloj, kiuj freneze brue preterpasas ilin, ŝajnas monstroj ne-harmoniantaj en tiuj belaj kamparaj scenoj. Ĉevaloj trankvile trotas, meze de la nova civilizacio. Ho, la benzino nun tiom multe kostas, ĉu ili ne povas sinjore troti, ili kiuj bezonas nur la bonan herbon de la belaj paŝtejoj, kaj poluas nur per fekaĵo utila al la terkultivado.

(sekvota)

Ginette MARTIN

88290 Saulxures-sur-Moselotte

Noto de la redaktanto de "La Informilo"

Tiun ĉi-suban mesaĝon ni ricevis de niaj amikoj kaj samcelanoj *Bruno kaj Anne Masala*...

Sincere dirite, tiom riĉas kaj ampleksas la aludita taglibro, ... ke ni rezignas pri ŝovo en nian bultenon por ne "senflorigi" ĝin!...

Nu, frandu ĝin, vizitante la indikitan elektronikan adreson ! Vi malfacile forlasos la ekranon !...



"...Karaj kaj estimataj,

Dum julio, nia familia triopo, *Anne, Bruno kaj Elisabeth*, vojaĝis en Ĉekio, Rumanio, Hungario...

Ni tre bonvenigas vin al nia taglibro, kie vi povas legi, interalie:

- raporton pri *IKUE-kongreso* en *Velehrad*,
- praktikaj demandoj kiel vojaĝi kun 11-monata bebo,
- kiel ni diskonigas Esperanton kaj la Katolikan Eo-movadon,
- pri *OSIEK-konferenco* en *Timisoara*,
- pri renkonto kun *Mons. Jakubinyi*, ĉefepiskopo de Alba Iulia,
- pri vizito de urbo *Gyor*, Hungario, ktp

<http://www.breviero.org/amb/>

La tuta teksto estas ilustrita per multaj fotoj, sondokumentoj kaj filmetoj. Ni deziras al vi agrablan legadon... "

Anne & Bruno Masala <mailto:amb@osiek.org>

LA KANCERKLINIKO ... labor-renkonto por "tridekjarulo"...

Kadre de la esperanto-centro *KVINPETALO* en Bouresse (Francio), okazis kvartaga semajno pri historio de la gazeto « *LA KANCERKLINIKO* » (*LKK*), sendependa, kultura, politika, ajnista, sed tamen ĉijare tridekjara.

Prezento, analizado, rakonto de anekdotoj, klaĉaĵoj, admiraj sentoj, laŭlegadoj, foliumadoj okazis, prezentitaj de ĉeestantaj respondeculoj - *Jacques LePuil - Serge Sire - Jopetro Danvy - A. Lequint*... rilate la 140-on da numeroj (kun la suplementoj) jam aperintaj.


Dank' al kamerao eblis havi tri longajn diskutojn kun Ĉinio kaj respondeculo, ĉinologo kaj supologo *Laurenco Septier*, verkisto *Mao Zifu, A. Lazarus*, ktp...

Inter aliaj eventoj el tiu kunveno, okazis prelego, komuna skribado de teksto (kun helpo el Ĉinio), kantado de *Jacques le Puil*, ekskurso, ... Jen abunda programo por la abunda ĉeestantaro.

Rendevuo post deko da jaroj, dum hundaj tagoj....

BADEN-BADEN... Kiel atingi la staĝejon?...

Per aŭto: La junulargastejo situas en la Okcidenta urbo, **tuj apud la naĝejo**.



Iru al *ekspresvojo Karlsruhe-Basel*, *elirejo Baden-Baden*. De tie per **strato B500** en la urbon, prenu **Schwarz-wald-straton** (*iom dekstren*), poste *dekstren* en **Murg-str**, *dekstren* en **Rhein-str**, *maldekstren* en **Kleine Dollen-str**, *duondekstren* en **Geisbühl-str**, fine *dekstren* en **Hardberg-str**, kie vi atingos la celon (en gloro) ! ...

Legenda verko...

“ La afrika medicino – Mirige efika ”

Fidela membro de nia federacio, Profesoro Jacques ROUX, ektradukis en 2005 en Esperanton la verkon de sia kolegino, Profesorino Doktorino Yvette PARÈS : **La médecine africaine, une efficacité étonnante** (Editions Yves Michel, 2004). Okaze de la UK en Florenco la esperantlingva traduko aperis ĉe eldonejo KAVA PECH : **La afrika medicino - Mirige efika.**



La aŭtorino baraktis por rekono de la sukcesoj de la afrikaj tradiciaj medicinistoj ĉefe en la kuracado de lepro, sed ankaŭ por la rekono de pruvitaj sukcesoj en la flegado de aidoso. Ŝiaj plurfakaj universitataj titoloj ne ebligas dubojn pri la seriozeco de ŝiaj laboroj. Malgraŭe ŝi bezonis luktegi kontraŭ antaŭjuĝoj, ĵaluzoj kaj interesoj personaj de samfakuloj kaj politikistoj afrikaj, kiuj preferis kuracadon laŭ « moderna » multekosta medicino blankula. Tio ne malhelpis ŝin konstrui kaj ekadministri sian hospitalon kun la nomo TRADICIA HOSPITALO DE KEUR MASSAR, 25 kilometrojn for de Dakaro (Senegalio).

Sendube vi aprecos tiun interesezan verkon, kiun proponas al vi nia libroservo. Cetere : ne hezitu konsili la legadon de la franca originalo al viaj konatoj. Ili povos mendi ĝin en iu ajn franca librovendejo. Eble vi eĉ deziros helpi la hospitalon !

... Kaj dankon al Profesoro ROUX, kiu pliriĉigis la esperantlingvan fakliteraturon per nova verko kaj novaj fakterminoj, kies signifon vi malkovros sur la lastaj paĝoj de la libro.

Edmond Ludwig



Lastminute...

Libro-servo

Ankaŭ je via dispono dum la kultur-semajnfino en Baden-Baden

- La broŝuroj „*l'essentiel*”

- Verko de Jacques Farjon de la Gatinerie, kies reeldonon prizorgis nia amiko Tsukuru Harada

- „*La afrika medicina, mirige efika*” de doktorino Yvette Parès, tradukaĵo de nia samideano Jacques Roux

Pri originala frandiga recepto !...




El la urbo BAR-le-DUC originas lorena, rara kaj certagrade miskonata specialaĵo, t.e. la konfitaĵo de riboj unue senkernigitaj per anserplumo ! Tiu tradicio, certe unikas en la mondo, tial ĝi ricevis kromnomon : “kaviaro de Bar”. Ĝi estis menciita por la unua fojo en la jaro 1344. Taksata kiel luksaĵon, ĝia fameco disvastiĝis sufiĉe rapide en princaj kaj aristokrataj medioj, aparte ĉe la korto de la reĝoj . Famuloj kiel Victor Hugo kaj Alfred Hitchcock ĝin frandis ! Al la respublik-prezidento Raymond Poincaré ni ŝuldas la alvenon de la konfitaĵo sur la tablon de la Elysée Palaco...

Ek de la komenco postulis la tasko de la “laboristino” longan trejnadon. Ĉiun beron ŝi tenas inter la polekso kaj la montrofinĝro, ŝi plej atente boras la berohaŭton per anserplumo bevele tranĉita kaj forigas la kernetojn sen damaĝi la pulpon ! Neniu maŝino kapabla plenumi tiun taskon... Tri horoj necesas por obteni unu kilogramon da « pretigitaj » beroj. Ilin oni ankaŭ delikate elverŝas en supraĵe bolantan sukeron... Tial konservas la beroj siajn guston kaj koloron .

Jen tio, kiu kontribuas al “surpodiumi” tiun vere bongustan dolĉaĵon, la plej rara, la plej malnova kaj sendube... la plej multekosta el la francaj konfitaĵoj.

Ni aldonu, ke okazas regule tutmonda ĉampionkonkurso por kroni la plej lertan “senkernigistinon” !...

ATENCIÓN! KONKURSO!**"ABIO DE ESPERO"****(Kristnaska Abio)**

De 1521 en la regiono Alzaco de Francio estas malnova tradicio ornamu arbon dum decembro por la Kristnaska periodo.

La asocioj de WINTZENHEIM-COLMAR (Alzaco) lanĉas konkurson por infanoj kaj gejunuloj pere de Esperanto.

ORNAMU nian urban abion dum decembro 2006

per desegnaĵoj pri espero, paco, Kristnasko; poemoj

en via nacia lingvo + Esperanto; kantoj; fotoj; man-laboraĵoj k.t.p.

Via(j) kontribuado(j) estos fiksita(j) sur la abio en la Halo de la urbo-centro dum decembro !

Sendu via(j)n verko(j)n antaŭ la 30/11/2006 al:

TAKE-ESPERANTO "Konkurso Abio"

90, Rue du Tiefenbach

F-68920 WINTZENHEIM-COLMAR, Francio

NEPRE skribu vian nomon, adreson, aĝon kaj kelkajn vortojn en Esperanto.

La konkursaĵon vi povas sendi ankaŭ retpoŝte al: clbm@wanadoo.fr

PREMIOJ - La unuaj de ĉiuj kontinentoj ricevos 75 eŭrojn, la ceteraj diversajn premiojn. (Informoj en diversaj Esperantaj gazetoj)

... pri amika migrado ...

Dimanĉon 27 an de aŭgusto, 15 gesamideanoj el "Bavelo" kaj Loreno renkontigxis en *Lautenbach* por migri en la Nigra Arbaro.

La celo estis la *Moosturo* sur la monto Moos, je 874m. En la komenco, la vojo estis kruta, la ĉielo nebula. La partoprenantoj penegis, sed la pinton ili atingis dank'al du manĝpaŭzoj kun pomoj, kolbasspecoj, blankaj aŭ ruĝaj vinoj, veraj mirabeloj el Loreno kaj aliaj frandaĵoj, kiujn ili povis gustumi babilante, ŝercante aŭ ridante.

Apud la turo sur la monto, ni abunde piknikis kolbasojn, fromaĝojn kaj fruktojn.... Vinoj ruĝaj kaj blankaj finrevigligis la pilgrimantojn. La plej kuraĝaj eĉ grimpis la 201 ŝtupojn al la pinto de la turo. La suno venis kaj elnebulĝis belega pejzaĝo !

Post la manĝo, la nebulo tute malaperis... kaj venis pluveto.

Survoje, ni haltis en bela kabaneto, de kie oni tre bone vidis la grandan apudvalon de *Renchtal*. La lastan botelon da vino ni malplenigis kaj daŭris la marsxado ĝis kamparana subĉiela kuglejo, kie ni ekludis. Bedaŭrinde ni tuj ĉesis ĉar venis fulmontondro ! Ni do rapidis subtegmenten de bona distilejo, kie ni longe diskutis pri la farado de nigra arbara prun-aŭ-ĉerizbrandoj !....

Post tia sporta marŝado, necesis refortiĝi. Do ni haltis en gastejo, kie ni gustumis ĉerizkukon kaj "*Nigran Arbaron*"!

Venis la tempo forlasi la varman etoson de tiu agrabla tago. Ĉiuj salutis sin reciproke kaj promesis reveni la sekvontan jaron.

Korajn dankojn al la organizantoj !

Liliane BERSWEILER



El nia libroservo

Informoj



⇒ La libroservo partoprenos la aŭtunan staĝon en Baden Baden la 20/22ajn de oktobro 2006. Se vi volas certe trovi deziratan libron tie, mendu ĝin antaŭe al la adreso poŝta aŭ reta de la libroservo (Libroservo 37 rue Pierre et Marie Curie FR 54500 VANDŒUVRE) libroservo.efe@wanadoo.fr

REVOLUCIO ĈE SAT AMIKARO : la Nova Racia Kurso eks-noviĝis kaj rejuniĝis!



Depost 1921, 9 eldonoj de la fama lernolibro instruis la lingvon al kvantoj da lernantoj ne ĉiam sataj, sed almenaŭ soifantaj je malkovrado de la internacia lingvo.

Mi mem eklemis antaŭ pli ol dudek jaroj per eldono de 1973, kiu ankoraŭ vendiĝis ĉijare. Moderniĝo necesis. Subite ĝi alvenis !

La ne plu nova Racia Kurso konservis sian ĝeneralan strukturon : 17 lecionojn kaj la saman sinsekvon de temoj kaj gramatikajoj.

La tekstoj iom evoluis (en la «malgranda sed agrabla ĉambro», la patro daŭre ripozas dum la edzino aktivas, sed anstataŭ legi ĵurnalon, li rigardas la televidon kaj ŝi ne plu trikas sed laboras apud komputilo !),

kaj definitive neŭtraliĝis (la najbaro, kiu promenas, dum la patro laboras en la kampo, ne plu estas riĉa sed maljuna !)

Koloroj invadis la libron kaj igas ĝin pli agrabla kaj klara. Ankaŭ la desegnoj estas tute refaritaj kaj modernigitaj.

Interesa novaĵo estas la historia rubriko aldonita al ĉiu leciono. Nova pruvo al la

kontraŭloj, ke nia lingvo havas ankaŭ kaj kulturen kaj historian enhavon

Alia novaĵo iom diskutinda : la korekto de la ekzercoj kaj de la tekstoj aperas en la fino de la lecionoj. Certe, tio permesos al memlernantoj sin korekti mem. Aliflanke, tio riskas iom fuŝi la disvolvon de parolaj kaj perkorespondaj kursoj. Eble estintus pli bone vendi apartan kajeron kun korektoj al la instruantoj aŭ la memlernantoj ?

JLT

Cours rationnel d'esperanto, lernolibro, 176 p, Opo, Sat Amikaro, 10,00 €

Por mendi librojn:



- Vi sendas vian mendon
 - per poŝto (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDŒUVRE (uzante la dorsflankan aŭ alipaĝan mendilon)
 - per e-poŝto al [«libroservo.efe@wanadoo.fr»](mailto:libroservo.efe@wanadoo.fr)
 - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 19a horo.
- Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj (maksimume 3,58 euroj por adreso en Francio)).
- Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo. Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo

Jus alvenintoj



La vintra fabelo, Teatraĵo, 160 p, **Shakespeare U.E.A.**, **14,10 €**.

Verko de Shakespeare tradukita de Humphrey Tonkin.



La morto en Venecio, Romano, 88 p, **Thomas Mann, F.E.L.**, **7,50 €**,
Romano de fama germana verkisto tradukita al esperanto de Petro Buijnsters.

El la libro faris filmon Luchino Visconti.




Historioj...Rakontu !-Rakontoj kaj proverboj, 126 p, **Herman Nyeck Liport kaj Chamberline Nguefack Zedong Afriknatur-Esperanto** **18,00 €**

15 belaj afrikaj rakontoj por infanoj kaj kolekto de proverboj .

Bildoj pri Norda lando kaj aliaj rakontoj Memoraĵoj kaj rakontoj 360 p, **Sen Rodin, F.E.L.** **24,00 €**

Rakontoj de sudulo, kiu restadis plurajn jarojn en norda lando kaj priskribas siajn tieajn spertojn.



La viro kiu plantis arbojn Rakonto 32 p, **Jean Giono, UTOVIE.** **6,30 €** .

Maljuna viro dediĉas la finon de sia vivo al replantado de arboj en provencaj montetoj.

Fundamento de Esperanto (nederlanglingva) Lingvo 136 p , **Zamenhof, F.E.L...** **10,00 €** .

Pro mendo-eraro, tiu nederlandlingva fundamento de Esperanto alvenis al la libroservo. Ĝi tamen povas interesi fakulojn.




Legendoj pri SEJM Movado, 232 p **Mikaelo Bronŝtejn IMPETO**, **15,00 €**

Famekonata Mikaelo Bronŝtein rakontas pri eventoj okazintaj en la Sovetia Esperantista Junulara Movado inter 1965 kaj 1978.

Jomo slavumas : K-disko, 24 kanzonoj, **Jomo, Vinilkosmo** , **18,00 €**

Per 24 kanzonoj, Jomo vojaĝigas nin ne nur tra slava popolkantaro sed ankaŭ tra jida, cigana, kozaka kaj ĉuvaŝa.



✂

MENDILO

Bonvolu sendi tiujn librojn:

al jena adreso:

-
-
-

S-ro/ino

-

En

la

Subskribo:

Sekretoj de niaj tempoj

Napoleono

Limonada komploto

Napoleono Bonaparte forlasis ĉi-tiun mondon antaŭ-tempe, malproksimigita de sia patrujo. Li mortis kontenta, paciĝinta kun la sorto? Aŭ, ĉu iu helpis al li forlasi ĉi-tiun mondon?

Post malvenko apud Waterloo la reganto de preskaŭ tuta Eŭropo, falis en depresion. La plimultan tempon de sia vojaĝo en lokon de indiko li tradormis. Sed krom tio nenio vidigis, ke li estas malsana. En tempo de enkarcerigo Napoleono estis 46-jara, estis homo sana, plena de fortiko kaj kiel certigas la atestantoj, li volis ankoraŭ batali pri la trono. Sed sufiĉis ses jaroj de restado sur la insulo Sankta Helena sub singarda "ŝirmo" de angla garnizono, ke ĝisvorte estingiĝu la brilo en liaj okuloj. Kial tiel okazis? Ĉu eble lin turmentis la mortiga malsano, pri kiu neniu sciis?

Arseniko en hararo

Tuj post la morto de Napoleono estis farita sekco de la kadavro, kiun realigis lia persona kuracisto Francesco Antommarchi. Tiu-ĉi eminenta patologo preparis du raportaĵojn. El la unua ankoraŭ desur la insulo Sankta Helena vidiĝis, ke Napoleono mortis pro kancero de stomako. Sed en la dua onidire (el Parizo) la kaŭzo de la morto estis inflamo de hepato kaj difekto de pulmo, de lieno kaj de renoj post veneno de organismo. Antommarchi ne kuraĝis skribi, ke la veneno estis intenca.

Krom tio jam post kelkaj semajnoj aperis legendoj, ke al la imperistro oni donis arsenikon. La murdon devis fari la angloj, kiuj supozis, ke Napoleono emas denove surtroniĝi. Estis necese atendi ĝis la jaro 1960 por la unuaj pruvoj, ĉu la raportaĵoj estas veraj. Tiam sveda kuracisto Sten Forshufvud konkludis, ke la reganto estis venenigata dum pli longa tempo, same kiel la sveda reĝo Erik XIV-a, mortinta en jaro 1577. La argumenton de d-ro Forshufvud konfirmis la esplorado, kiu pruvis enhavon de arseniko en la hararo de Napoleono en granda kvanto superanta ordinaran dozon, ĝis 39-oble. La kontraŭuloj oponis, ke tio estas rezulto de trinkado de tro granda kvanto da vino, kiun tiam oni konservis per arseniko. Sed tiamaniere ja ne eblis enigi en la organismon tiom da veneno eĉ se Napoleono trinkus ekde mateno ĝis vespero.

La kulpulo forviŝis la spurojn.

En pluaj jaroj aperis sensaciaj hipotezoj pri la kialo de imperiestra morto. Profesoro Steven KARCH el San Francisko asertadis, ke la reganto mortis je tro granda fervoro de kuracistoj. Napoleono plendis pri digestaj malhelpoj, tial li ĉiutage ricevis klisteron kaj laksilon. Laŭ supozo de la profesoro, tio kondukis al elmergigo de potaso el organismo de paciento kaj la manko de tiu-ĉi elemento kaŭzas, ke komencas aperi diversaj kor-difektoj kaj malfortiĝas la alfluo de sango en la cerbon, kio sekve de tio kialigis la tujan morton.

Interesan teorion prezentis svislanda sciencisto Aleksandr Lugli. Pruvon el dekdu jaroj de kalsonoj de l'imperiestro devenantaj el diversaj sezonoj de lia vivo. Kiam ili havis perimetron de lia talio, li do konkludis, ke Napoleono ekde jaro al jaro estis ĉiam pli kaj pli malgrasa, en lasta tempo de sia vivo malgrasiĝis je 15 kg! Laŭ la sciencisto Napoleono havis tumoron en la stomako. Sed dum longtempa digestado de organismo tiu-ĉi procedo estas la sama.

Pro manko de kontentigaj pruvoj d-ro Forshufvud ankoraŭ foje komencis studi la korografion de Napoleono. Oni denove esploris la nivelon de arseniko en la hararo de Napoleono. Vidiĝis, ke foje ĝi sinkas, foje altiĝas, kio povas esti pruvo de tio, ke iu donas al la reganto plialtigitan dozon de veneno, pli poste ĉesis kaj poste denove la dozojn altigadis. La sveda sciencisto komparadis la rezultojn de esploroj kun la registroj el lastaj semajnoj de la vivo de Napoleono, kiam li plendis pri revenantaj doloroj de hepato kaj stomako. La



daŭro de la malsano de la imperiestro okazis en la tempoj, kiam la dozo de arseniko en la hararo estis plej alta.

La lasta cirkonstanco parolanta pri efiko de la veneno estis la stato de restaĵoj de Napoleono. En tempo de lia morto, angloj ne konsentis pri traveturigo de lia

korpo en Francion, sed persistis, ke li estu enterigita sur la insulo, kie la tero estas tro malseka, ĝi helpas al pli rapida malfondiĝo. En kazo de eltombigo estus neeble ion aperigi. Nur 19 jarojn post la morto de Napoleono estis eble transveturigi liajn restaĵojn en la patrujon. Kiam en 1840 lia tilia ĉerko estis malfermita, vidiĝis, eĉ kiam lia korpo ne estis mumiigita, ke ĝi konserviĝis en preskaŭ neŝanĝiĝinta stato. Tiamaniere povis "enkonservi" la korpon de la imperiestro nur granda dozo de arseniko. Kiam Napoleono restadis sur la insulo, lia populareco rapide kreskadis en lia patrujo, male sinkis la populareco de la reganta dinastio de Bourbonoj. Tial ne nur angloj, sed ankaŭ la regantaj francoj timis, ke la imperiestro denove eliĝos el ilia kontrolo kaj ke li kun subteno de popolo akiros la tronon. Kune do ili planis atencon sur lian vivon. La morto de Napoleono devis aspekti kiel tute natura, ĉar la murdo povis konduki al revolucio.

Murdiga kuracado

La komploto ekestis jam en la jaro 1815 inter HUDSON LOVE, komandanto de angla garnizono sur la insulo kaj inter konfidato de Napoleono, la grafo CHARLES de MOTHOLON. La plano de venenigo konsistis el 3 partoj. La unua estis

sistema aldonado de veneno en la limonadon. Arseniko estas senkolora, sengusta, senodora, do tiampe ne malkaŝebla. Poste devis sekvi la dua etapo, kiam la organismo de Napoleono alkutimiĝis al la aldonata dozo, ĝi estis plialtigita kaj samtempe lia manĝaĵo estis senigita de mineraloj (eksplikata pro malhelpo de la transportado). Tiampe komencis aktivi d-ro Antommarchi, kiu alternis la pli fruan personan kuraciston. Temis pri tio, ke la nova kuracisto ne povu orientiĝi ĝis tiamaj malsanoj de la imperiestro. La tria etapo de la komploto komenciĝis en 1821, kiam estis aplikataj medikamentoj tenantaj la venenon en la organismo.



Strange estis, ke Napoleono pacience toleris ĉiujn ĉi medikamentojn, eĉ kiam li sentis, ke ili ruinigas lian sanon.


En la testamento, kiun Napoleono skribis mallonge antaŭ sia morto, li rimarkigis: "Mi mortas antaŭ-tempe murdita de angla oligarkio kaj de ĝia aĉetita murdisto HUDSON LOVE. Neniam ili sukcesos tion sekretigi."

Tradukis Jaci el Spirit


ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2007 ĝis 2009

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2006, pagi vian abonon al **La Informilo** kaj vian membro-kotizon por nia asocio.

Jaroj:	2007	2008	2009
Abono por adresoj en Francio:	12 eŭroj	12 eŭroj	12 eŭroj
Abono por adresoj ekster Francio:	16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
Federacia kotizo:	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
Pagmanieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2007 por 1027		
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de: Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2007, 2008 ktp. Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.		
	3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)		
	4. Per internacia ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)		



DISTRANGLILO



Vortludo ★

(liter-sudoko)

Plenigu la tabelon, tiamanier ke ĉiu linio, ĉiu kolumno, kaj ĉiu kvadrato 3x3 entenu nur unufoje ĉiujn literojn de la proponita vorto.
(sendis al ni nia samideano Joël Grandjean).

LUDO

			L
	O		
U		L	
		D	

ANSERO

E					O
	N				
	R		S		
		N			R
	S			R	
O					

NATURISMO

	U		M					O
		S	R				I	T
		R		O	T	N		U
	O	A		M				R
	N		T		R		M	
S				N		T	U	
A		U	O	I		S		
R	M				U	A		
I					A		T	

Mistera krado ★

Transigu la literojn -alfabete kaj vertikale ordigitaj- de la supra krado al la suba... Plenigita, tiu krado donos al vi faman aserton de Einstein...

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13
1	D	A	C	A	E	A	A	A	E	A	E	N	A
2	E	E	C	E	E	N	E	C	N	L	I	O	A
3	E	K	H	I	H	N	E	D	O	N	J	R	L
4	J	N	I	O	R	O	F	I	P	N	O	R	N
5	K	O	J	S	S	R	I	O		M	S	U	
6	N	R	J	V	U	S	M	S		P	T		
7	T		Z		V	T	S	V		R	U		
8	U				T	S		S					

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13
1													
2													
3													
4													
5													
6													
7													
8													

Vertikala enigmo ★

Helpe de la ĉi-supraj vort-eroj alfabete ordigitaj, malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, donas aserton de Paul Morand

ak al ek ep et io ite ito ko lo lo lo ma men na na no on op
oso pla ra ro ska smo so spi sto to to to to tru ve

- | | | | | | | | | | | |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|-----------------------------------|
| 1 | + | - | - | + | - | - | - | - | - | venena herbo |
| 2 | + | - | - | + | - | - | - | - | - | saĝa konsilanto |
| 3 | + | - | - | + | | | | | | narkota substanco |
| 4 | + | - | - | + | - | - | | | | kondensita rakonto |
| 5 | + | - | - | + | - | | | | | spirita atmosfero |
| 6 | + | - | - | + | - | - | - | | | ĝi determinas substantivon |
| 7 | + | - | - | + | - | - | | | | muzika komponaĵo |
| 8 | + | - | - | + | - | - | | | | koncentriĝo de entreprenoj |
| 9 | + | - | - | + | - | - | - | - | | informlibreto por la kuranta jaro |
| 10 | + | - | - | + | - | - | - | | | helikoida kurbo |
| 11 | + | - | - | + | - | - | - | | | ujo ordinare kun kovrilo |
| 12 | + | - | - | + | - | - | - | - | - | psikorigina emanaĵo |

Solvo de la lasta enigmo (134)

pastroj ne bedaŭras sian fraŭlecon kiam ili aŭskultas konfesojn de virinoj



Internacia Junulara Kongreso 2006 – SARAJEVO



Ponto Vecchio



katedralo de Pizo



migrado en Vogezoj



Santa Maria Novella



lago de la "Kvar Kantonoj"